

Lektion 6 / Leciono ses (236 novaj vortoj)

1.1 El mia vivo kiel studento

Saluton! Mia nomo estas Birgit.

Hodiaŭ mi volas paroli al vi pri mia vivo kiel studento.

Mi havas familion, unu fraton kaj unu fratinnon, sed ni loĝas dise.

Mi studas en la universitato de malproksima urbo.

1.2

Kvankam mi ne krome laboras,

mi havas sufiĉan monon por vivi, ĉar miaj gepatroj pagadas mian studon.

1.3

„Labori“ signifas tie ĉi: „labori per la manoj“, „permane labori“, „manlabori“, ĉar mi jes ja laboras:

Mi estas studento, do, mi laboras ja per la kapo.

1.4

Mia ĉefa fako estas lingviko,

ĉar mi volas iĝi lingvisto.

Krome mi studas la Germanan kaj la Francan lingvojn.

Mi estas nun en la sepa semestro.

La antaŭ-ekzamenon mi jam trapasis sukcese.

1.5

Ordinara labortago de mi pasas jene:

Matene, je la sepa horo,

mia vekhorloĝo vekas min, frue, eĉ tro frue, pensas mi ĉiam.

Mi matenmanĝas nur malmulte, kutime nur iom da pano, kaj trinkas du tasojn da kafo.

Antaŭ ol forlasi la domon,

mi kunpakas miajn kajerojn kaj librojn.

dis/e : verstreut

proksima : nah/er, nächst/er (-e, -es);

mal/proksima : fern/er (-e, -es)

kvankam : obwohl

krom : außer; krome : außerdem

ja : bekanntlich, ja; jes ja : durchaus

kapo : Kopf

ĉef- : Haupt-

fako : Fach

-ik- : (Wissenschaft)

lingv/iko : Linguistik, Sprachwissenschaft

lingv/isto : Linguist, Sprachwissenschaftler

la Franca [lingvo] : Französisch

semestro : Semester

ekzameno : Examen

tra : durch

pasi : hindurchziehen; vergehen

trapasi : durchqueren

sukcese : erfolgreich

ordinara : gewöhnlich

mateno : Morgen

veki : wecken

eĉ : sogar

frue : früh

pano : Brot

kutimi : gewöhnt sein

taso : Tasse

kafo : Kaffee

antaŭ ol : bevor <mit Infinitiv>

lasi : lassen; for/lasi : verlassen

paki : packen

kajero : Heft

Poste mi prenas mian biciklon
kaj biciklas al lekcio.

1.6

Kelkaj lekcioj estas tre interesaj,
aliaj foje tro malfacilaj.
Studi ne ĉiam estas plezuro,
tion mi devas konfesi.
Dum la tagmeza paŭzo mi kutime
restas en la universitato kaj tagmanĝas
en la studenta manĝejo.

1.7

Posttagmeze mi prenas la liston kun farendajoj.

Unue mi iras al la universitata biblioteko
por kolekti la legendajn librojn

kaj kopias artikolojn.

Poste ni studentoj sidas ofte duope aŭ trioje kune
por cerbumi pri iuj specialaĵoj el la lekcioj.

1.8

Fine mi iras hejmen por plulegi aŭ tajpi iom,
antaŭ ol vespermanĝi.
Vespere mi devas ofte ankoraŭ multe lerni kaj
skribi, foje eĉ ĝis malfrue en la nokto,
ĉirkaŭ noktomezo.
Tia estas mia ĉiutago.

2. Demandu alian personon per la subaj demandoj:

2.1

Kio Birgit estas?
Ĉu la loĝ-urbo estas proksima?
Kiom da gefratoj havas ŝi?
La kioma infano estas ŝi laŭ-aĝe?
Ĉu ŝi havas sufiĉe da mono?

2.2

Kiun ĉefan fakon Birgit studas?
Kio ŝi nome volas iĝi?
En la kioma semestro estas ŝi?
Ĉu ŝi jam pasis tra la ekzameno?

2.3

Kio vekas la studentinon kutime?
Ĉu estas tiam matene, tagmeze aŭ posttagmeze?
Je la kioma horo la vekhorloĝo vekas Birgit?
Ĉu ŝi pensas, ke la horloĝo vekas ŝin je ĝusta tempo?

biciklo : Fahrrad
lekcio : Vorlesung

interesa : interessant

plezuro : Vergnügen
konfesi : bekennen, gestehen, zugeben
mezo : Mitte; tagmezo: Mittag

-end- : (Verpflichtung)
far/end/aĵo : etwas zu Machendes
biblioteko : Bibliothek
kolekti : sammeln
leg/enda : zu lesend/er (-e, -es)
kopii : kopieren
artikolo : Artikel
-op- : (zu mehreren)
du/ope : zu zweit; tri/ope : zu dritt
-um- : (verwandter Begriff)
cerbo : Gehirn; cerbumi : grübeln

tajpi : tippen (per Tastatur)

vespero : Abend
ĉirkaŭ : um ... herum
nokto/mezo : Mitternacht
tia : so (beschaffen)
ĉiu/tago : Alltag

laŭ-aĝe : altersmäßig, dem Alter nach
sufiĉe da mono = sufiĉan monon

Kiom manĝas Birgit matene?
Kiom da tasoj de kafo trinkas Birgit?

2.4

Ĉu vi konas ŝian labortagon?
Per kio ŝi veturas al la lekcionoj?
Kiaj estas la lekcionoj foje?
Kion ŝi faras dum la tagmeza paŭzo?
Ĉu Birgit fine de la tago havas liberan vesperon? libera : frei

3. Konstruu demandon el la vortoj en la subaj linioj,
kaj alia persono respondu ĝin:

- 3.01 (Birgit, havi, profesio)
- 3.02 (kial, havi, kromlaboro)
- 3.03 (personoj, familio)
- 3.04 (kiam, horloĝo, vekoj, Birgit)
- 3.05 (manĝi)
- 3.06 (tiam fari)
- 3.07 (fakoj, studi)
- 3.08 (kia, lekcio, universitato)
- 3.09 (Birgit, tagmezo)

4. Demandu nun alian personon pri ties vivo:

(Reagu al la respondo foje ŝerce per: „Domaĝe!“)

domaĝo : Schaden, bedauerliche Sache
Domaĝe! : Schade!

4.1

Kiom da jaroj vi havas?
Ĉu vi flue parolas Esperanton?
Ĉu vi kutime estas ĝustatempa?

flui : fließen
ĝustatempa : pünktlich, rechtzeitig

4.2

Je kioma horo vi vespere enlitiĝas?
Dum kiom da horoj vi dormas nokte?
Ĉu vi ŝatas legadi en la lito?

enlitiĝi : ins Bett gehen

4.3

Ĉu vi manĝas viandon
aŭ ĉu vi estas vegetarano?

viando : Fleisch
vegetara : vegetarisch
vegetarano : Vegetarier
margarino : Margarine
anstataŭ : anstatt
butero : Butter
teo : Tee

Ĉu vi havadas margarinon anstataŭ butero sur via pano?

Ĉu vi ŝatas trinki kafon aŭ ĉu vi pli ŝatas teon?

Ĉu vi trinkas vian kafon nigra
aŭ ĉu vi prenas lakton aŭ sukeron por via kafo?

sukero : Zucker

Ĉu vi trinkas vian teon dolĉa aŭ sen sukero?

Ĉu vi ŝatas vinon pli ol bieron

vino : Wein

biero : Bier

aŭ ĉu vi estas ĝenerale kontraŭ alkoholaĵoj
kaj trinkadas akvon aŭ aliajn senalkoholaĵojn?

ĝenerala : allgemein, generell
akvo : Wasser

4.4

Kion vi faras ekster via labortempo? ekster : außerhalb

Ĉu la vivo estas por vi plezuro
eble malgraŭ kelkaj malbonaĵoj? malgraŭ : trotz

5. Kiel tekstu la subaj frazoj komplete? teksti : lauten (Text)

5.1 Hieraŭ mi kuŝ... en mia lito kaj dorm... ,
kiam mult... tro fru... vekis mi... mia vekhorloĝo.

5.2 Mi povis ankoraŭ long... pludormadi,
sed ankaŭ studento estu ĝustatemp... .

5.3 Tial mi ellitiĝis, vestis mi... kaj komencis matenmanĝ... .

5.4 Mia matenmanĝo estis tre malriĉ... :

5.5 Mi trinkis nur unu taso... da kafo... kaj manĝis
iom da pano... sen buter... .

5.6 Kelkaj el mia... kajero... kuŝis sur la tablo,
sed kelk... alia... ankaŭ sur divers... seĝo... .

5.7 Mi prenis la kajero... kaj miaj... libro... kaj iris
el la ĉambro... ekster la domo... al mia... bicikl....

5.8 Sed ĝi est... difekt... .

5.9 Mi tre malĝoj...is kaj pensis: "Tia bicikl...o!
Mi est... vera malbonŝanc...o."

5.10 Do, mi iris pied... al la universitato.

5.11 En ties ĉefa domo estas la lekci...oj,
en kiu... mi havas mia... lekcio... .

5.12 Unue mi salutis miaj... kunstudento... .

5.13 Post... mi aŭdis, kio... la lekciisto dir... al ni... .

5.14 Tiu ĉi diris, ke ŝi baldaŭ ekzamen... ni... .

5.15 Tio estis ŝoko...!

5.16 Tial mi hodiaŭ komencis tre mult... studad... .

5.17 Sed mi timas, ke malgraŭ tio... jam pov... est...
tro malfru... .

5.18 Ho, kial mi ne pli frue komenc... lerni?

5.19 Ĉiam mi estas malĝustatemp...o!

6. Klarigu jenajn vortojn per uzo en komplete frazo: klara : klar; klarigi : erklären, erläutern

6.1 proksimulo (homo, proksima)

6.2 urbano (homo, loĝi, urbo)

6.3 lekciejo (ejo, aŭdi, lekcio)

6.4 noktomezo (horo, mezo, nokto)

6.5 geedziĝi (iĝi, edzo, edzino)

6.6 senŝuulo (homo, sen, ŝuo)

6.7 dormejo (ĉambro, dormi)

6.8 paŭzeto (mallonga, tempo, ne, fari)

6.9 vegetarano (homo, manĝi, viando)

6.10 tasotenilo (ilo, per, oni, teni, taso)

6.11 poste-ulo (homo, veni, post, oni)

6.12 Kiomas? (kioma, horo)

- 6.13 longharulineto (malgranda, virino, kun, longa, haro)
- 6.14 pensadi (longa, aŭ, intensa)
- 6.15 manĝemulo (homo, kutimi, multege, manĝi)
- 6.16 malĝustatempermulo (homo, kutimi, ne, ĝusta, tempo)
- 6.17 homaro (ĉiuj, homo, tero)
- 6.18 scivolema (ema, voli, scii)

7. Kion Birgit faras dum sia libertempo

libertempo : Freizeit

7.1

Birgit havas ankaŭ plurajn hobiajn.

pluraj : mehrere

hobio : Hobby

Unu ligas ŝin kun ŝia profesio:

ligi : verbinden

Ŝi helpas produkti specialajn universitatajn

produkti : produzieren, herstellen

paĝojn en la Interreto.

paĝo : (Blatt-, Papier-)Seite

reto : Netz; Interreto : Internet, Netz

7.2

Temas pri scienca bulteno por studentoj de lingviko.

temas pri ... : es geht um ...

scienco : Wissenschaft

bulteno : Mitteilungsblatt

Por tio laboras pluraj redaktistoj,

redakti : als Redakteur arbeiten, redigieren

kies kunsidojn prezidas ĉefredaktisto.

kunsido : Sitzung

prezidi : vorsitzen, leiten

Klare, ke Birgit ne estas la respondeca ĉefo,

-ec- : Eigenschaft

respond/eca : verantwortlich

nur ordinara membro.

ĉefo <m,f> : Chef, Oberhaupt, Anführer

membro <m/f> : Mitglied

7.3

Jen kaj jen ŝi intervjuas aliajn studentojn.

jen kaj jen : hin und wieder

intervjuo : Befragung, Interview

Krome ŝi en skatolo kolektas kelkajn artikolojn el gazetoj kaj raportas pri ili en la scienca studenta bulteno.

skatolo : Schachtel

raporti : berichten

Se studento, kiu legis ĝin, volas havi paperan version

papero : Papier

versio : Version

de certa numero, li povas elpresi ĝin el la Interreto.

numero : Nummer; Ausgabe

presi : drucken

7.4.

Dum sia cetera libertempo ŝi ŝatas, kaj aŭskulti

cetera : übrig

aŭskulti : zuhören, sich anhören

muzik-diskojn per poŝ-diskilo,

muziko : Musik

disko : Platte, Scheibe

kaj rigardi film-kasedojn,

poŝo : Tasche (im Kleidungsstück)

poŝ-diskilo : Taschenabspielgerät

filmo : Film

foje eĉ ĝis malfrue en la nokto.

kasedo : Kasette

Volonte ŝi jen kaj jen ankaŭ iras al teatrejo

volonte : gern
teatr/ejo : Theater (Gebäude)
kin/ejo : Kino (Gebäude)

aŭ rigardas filmon en kinejo.

Precipe plaĉas al ŝi modernaj Francaj filmoj.

precipe : vor allem; besonders
plaĉi : gefallen

Plie ŝi ŝatas foti, sed ŝi ne estas vera artisto.

plie : weiter, ferner
foti : fotografieren


Nur sporto ne donas al ŝi plezuron.

arto : Kunst
sporto : Sport

8. Mariŝa, kisu min (Slovaka popolkanto)

popolo : Volk

(Das folgende Lied am besten in verteilten Rollen singen: Also die Frauen die Texte der Strophen, die Männer jeweils den Refrain.)



Ĉi-uj kna-boj kaj kna-bi-noj a-mas sin, nur ne-ni-u ju-nu-le-to
a-mas min. Ma-ri-ŝa ki-su min, sen pe-to
al pa-trin', ŝi ju-na sa-me fa-ris, pri ki-soj ne a-va-ris.

8.1

1) ./.. Ĉiuj knaboj kaj knabinoj amas sin,
nur neniun junuleton amas min. ./..

neniu : niemand; kein

8.2

Rekantaĵo:

./.. Mariŝa, kisu min, / sen peto al patrin',
ŝi juna same faris, / pri kisoj ne avaris. ./..

re/kant/aĵo: Kehrsvers, Refrain
kisi : küssen
avara : geizig

8.3

2) ./.. Batas panjo, batas panjo, batas min,
ĉar mi amas, ĉar mi kisas, knabo, vin. ./..

-nj- : (Koseform für Frauen)
panjo : Mama

8.4

3) ./ Sidas panjo, sidas panjo, sur kortet',
dum mi estas en kamero kun knabet'. ./

korto : Hof
kamero : Kammer (kleiner Raum)

8.5

fonto: <http://www.angelfire.com/ok/stenjo/maris3.html> fonto : Quelle

8.6 Ludu la kanton nun kiel skeĉon.

-ĉj- (für Männer): paĉjo : Papa
(kommt im Sketsch vor)

8.7

Mariŝa:

Ho, neniŭ amas min. Ĉiuj miaj amikinoj havas amikon, kun kiu ili interkisas. Nur mi konas neniun, kiu volas min kiel amikino. Sed ... ĉu tie ne venas beleta junulo?

Knabo (venas):

Saluton, Mariŝa. Ho, kiom bela vi estas! Plaĉas al mi via vizaĝo. Mi pensas, ke mi amas vin.

Mi volas esti kun vi, mi volas resti kun vi, kaj kisi vin, kisi vian belegan vizaĝon, jes, kisi, kisi ĝin.

La aŭskultantoj kantas:

Mariŝa, kisu lin, sen peto al patrino'. Ŝi juna same faris, pri kisoj ne avaris.

8.8.

Mariŝa: (ne scias, kion fari)

(al la aŭskultantoj): Kion? Ĉu mi tuj kisu tiun knabon? Mi ne scias.

(al la knabo) Saluton, knabo mia. Dankon, ke vi diras, ke mi estas bela. Sed tio estas tro, mi ne estas bela, eble beleta, jes, eble iom beleta.

Kaj ĉu tuj kisi min? Mi ne scias. Jen prenu unue mian manon. Ĉu tio ne sufiĉas?

Knabo (prenas ŝian manon kaj ekkisas ĝin):

Ho, mia kor'! Kia mano!

(Rigardas la manon pli proksime, mallaŭte al si)

Kia mano!!! Mi povas legi la monolinion. Ŝi ricevos multan monon. Nun mi eĉ pli amas ŝin!

(Laŭte al Mariŝa) Ne, la mono – mi volis diri: la mano ne sufiĉas al mi, mi volas vin tuta, sed unue mi volegas kisi vin!

La aŭskultantoj ripetas: Mariŝa, kisu lin ...

8.9.

Panjo (alvenas, ekvidas ilin kaj ekkrias):

Ho, kion mi vidas? Li volas kisi Mariŝan. Tio ne eblas.

(al la knabo) For vian manon de mia filino! (al la aŭskultantoj) Ho, mi konas la junajn virojn. Unue oni interkisas kaj poste oni havas la problemojn: Neniun monon, neniun domon, neniun komputilon, sed bebon!

Knabo (kun timo): Kia ebla bopatrino!

Panjo (al Mariŝa):

Unu aferon mi diras al vi: Vi ne kisas tiun knabon ĉi tie, aŭ mi batos vin, ĉu vi komprenas?

(Ŝi foriras kaj restas dekstre, kie ŝi laboras en la korto)

8.10.

Mariŝa (al la knabo):

Mi ne komprenas panjon. Kiam ŝi estis juna, ŝi tute ne estis avara pri kisoj kaj multe kisadis la knabojn. Mi scias tion de mia paĉjo. Sed kion fari? Se ŝi diras, ke ŝi batos min, ŝi ankaŭ certe faros tion.

La aŭskultantoj kantas: Mariŝa, kisu lin ... dum **la knabo** kantas: Mariŝa, kisu min ...

8.11.

Knabo:

Sed ŝi diris, ke mi ne kisu vin ĉi tie. Ĉu ni ne povas iri en la domon por interkisi?

Mariŝa:

Bonege! Tio estas la solvo. Venu kun mi en mian kameron.

(Mariŝa kaj la knabo iras maldekstren)

Mariŝa (ridas):

Panjo estas nun en la korto, dum la knabo kaj mi estas en mia kamero kaj interkisas.

(Ŝi kaj la knabo ridas kaj ili forte interkisas.)

La aŭskultantoj kantas: Mariŝa, kisu lin ...

(Fino)

9. Demandu aliajn pri la temo: Kion vi faras en via libertempo?

Se vi ne scias vorton, serĉu ĝin en vortaro. En la Interreto estas ekzemple la Reta Vortaro.

La ret-adreso estas: <http://www.reta-vortaro.de/revo/>

- 9.1 Kiujn hobiajn vi havas?
- 9.2 Kies muzikon vi ŝatas aŭskulti?
- 9.3 Ĉu vi foje fotas per poŝ-fotilo?
- 9.4 Kiom da sportejoj estas en via urbo?
- 9.5 Ĉu vin interesas la foto-arto?
- 9.6 Kiom ofte en la jaro vi iras al teatro?
- 9.7 Kiaj filmoj plaĉas al vi?
- 9.8 Kiam vi uzas poŝdiskilon?
- 9.9 Kiun sporton vi ŝatas dum via libertempo?
- 9.10 Kiel ofte vi sportas, ĉu ĉiu-tage?
- 9.11 Ĉu vi emus kunludi en popola teatro?
- 9.12 Kiun popolan arton vi konas?
- 9.13 Kiom da muzikdiskoj vi havas?
- 9.14 Kiujn filmkasedojn vi havas?
- 9.15 Ĉu vi emus ankaŭ mem skribi libron?
- 9.16 Kiun muzikiston vi ŝatas?
- 9.17 Kiun muzikilon vi ludas?
- 9.18 Kiel ofte vi aliras la Interreton?
- 9.19 Kiuj paĝoj en la Interreto vin plej interesas?
- 9.20 Por kiu gazeto aŭ bulteno vi jam skribis artikolon?
- 9.21 Kiam vi skribas ankoraŭ permane?
- 9.22 Kial vi lernas Esperanton?

10. Temo: **Kiel oni salutas kiam dum la tago**

Legu jenan tekston. Ĉu vi komprenas ĉion?

10.1.

- Kiel oni salutas matene? Kion oni diras?

- Oni diras „Bonan matenon!“

Tio estas mallonga formo de „Mi deziras al vi bonan matenon!“

10.2.

- Kaj ĝis kiu horo oni diras „Bonan matenon!“ kutime?

- „Bonan matenon!“ oni kutime diras ĝis la dek-dua horo, do, ĝis la tagmezo.

10.3.

- Kaj kion oni diras kutime post la tagmezo?

- Post la tagmezo oni kutime diras „Bonan tagon!“

10.4.

- Kaj ĝis kiam oni diras „Bonan tagon!“?

- „Bonan tagon!“ oni kutime diras ĝis la dek-oka horo.

10.5.

- Kaj kion oni kutime diras poste?

- Post la dek-oka horo oni kutime diras „Bonan vesperon!“

10.6.

- Kaj ĉu oni diras „Bonan vesperon!“ ĝis la dudek-kvara horo, do, ĝis la noktomezo?

- Jes, se oni ne iras en la liton ĝis tiam. -

Nome, kiam oni volas dormi, oni diras „Bonan nokton!“

10.7.

- Kaj kion oni diras ekde la dudek-kvara horo? Ĉu „Bonan matenon?“

- Tion mi ne scias, mi ĉiam jam dormas tiam. (ridas)

11. Titolo: Birgit korespondas en la Interreto

korespondi : korrespondieren

11.1.

Birgit eksidas antaŭ la ekrano de la komputilo kaj ekigas programon por korespondado per retpoŝto.

ekrano : Bildschirm

poŝto : Post; ret-poŝto : Netzpost, e-mail

11.2.

Ŝi tajpas per la klavaro jenan retmesaĝon al sia amikino Anjo:

klavo : Taste; klavaro : Tastatur

mesaĝo : Botschaft, Mitteilung

Anjo (<= Anna + -nj-): Anja (Ännchen)

11.3.

Saluton, Anjo!

Mi dankas pro via lasta letero

lasta : letzt/er (-e, -es)

letero : Brief

kaj mi petas pardonon, ke mi tiel longe ne plu skribis, sed mi ne plu memoris vian ret-adreson.

ret-adreso : Netzpost-, e-mail-Adresse

11.4.

Krome mia retpoŝta kesto estis plena, eĉ plen-plena, bedaŭrinde ĉefe de trudmesaĝoj.

plena : voll; plen-plena : rappellvoll

ĉefe : hauptsächlich

trudi : aufdrängen; trudmesaĝo : Spam

11.5.

Mi havis ankaŭ problemon, eniri la babilejon de lernu.net. Mi ne ofte estas tie kaj ne plu memoris mian pasvorton. Mi daŭre forgesas tiajn informojn.

babili : schwatzen; babilejo : Chat

(lernu.net: Bekanntes Anfängerportal)

informo : Information

11.6.

Fine mi nun aktualigis mian retpaĝaron, precipe la ĉefpaĝon.

aktuala : aktuell

ĉef/paĝo : Startseite, Homepage

11.7.

Vi volis ricevi bildon de mi. Mi ne havas belan koloran, sed nur nigra-blankan. Mi skanis ĝin kaj jen sendas ĝin kiel alkrôçaĵon en la alkrôçejo.

Bv. elŝuti ĝin.

11.8.

Atentu, kiam vi respondas, ke la temlinio de via mesaĝo ne restu malplena; alikaze mia trudmesaĝa filtrilo eble

forviŝos vian tutan retroŝtaĵon.

11.9.

Mi devas nun ankoraŭ skribi tekston por la studenta forumo en la reto.

Do, korajn salutojn,

Birgit

koloro : Farbe

skani : scannen

kroçi : an-/aufhängen; alkrôçaĵo : Anhang (das Angehängte); alkrôçejo : Anhang (Ort)

ŝuti : schütten; elŝuti : herunterladen

tem/linio : Betreffzeile

kazo : Fall; alikaze : andernfalls, sonst

filtri : filtern

viŝi : wischen; forviŝi : löschen

forumo : Forum

12. Demandu kaj alia persono respondu:

12.1 Estas nun la 10a horo.

Kion vi tiam kutime diras al alia persono?

12.2 Estas nun la 14a horo.

Kion vi tiam kutime diras al alia persono?

12.3 Estas nun la 19a horo.

Kion vi tiam kutime diras al alia persono?

12.4 Estas nun la 22a horo.

Kion vi tiam kutime diras al alia persono?

12.5 Estas nun la 8a horo.

Kion vi tiam kutime diras al alia persono?

12.6 Estas nun la 23a horo kaj vi iras dormi.

Kion vi deziras?

12.7 Kiu estas la longa formo de:

"Bonan matenon!" / "Bonan tagon!" /

"Bonan vesperon!" / "Bonan nokton!" ?

12.8 Kiu estas la longa formo de: "Saluton!" /

"Dankon!" / "Gratulon!" "Sanon!" ?

Formu pliajn similajn demandojn!

sana : gesund, sano : Gesundheit

13. Interparolo: Legi ne estas laboro

13.1.

- Bonan tagon! Ĉu vi jam bone parolas Esperanton?

- Bonan tagon! Ne bone, sed mi jam sukcese trapasis la unuajn lecionojn.

- Ho, vi tamen jam flue parolas! Kaj kiu estas via profesio?

- Mi estas studento.

13.2.

- Do, vi ne laboras. Bonŝanculo!

- Mi jes ja laboras. Ĉu vi konas la vivon de studento?
- Mi pensas, ke jes. Studentoj havas bonan vivon.
 - De kio vi scias tion?
- Aŭskultu: Matene, kiam mi veturas al mia laborejo, mi vidas neniun studenton.
 - Ĉar ili estas en lekciejo kaj aŭskultas lekciojn.
- Tio povas esti. Sed mi pensas, ke ili ankoraŭ dormas.
 - Kaj ĉu tio estas ĉio, kion vi scias pri la vivo de studento?
- Ne, aŭskultu plu: Kiam mi veturas hejmen, posttagmeze, mi vidas multajn studentojn.
 - Bone, kaj kion ili faras?
- Ili sidas proksime al la universitato kaj legas librojn, neniu el ili laboras.
 - Kaj kiu estas via profesio?

13.3.

- Mi estas redaktisto de gazeto.
 - Ho, bone. Kaj ĉu vi skribas la tutan tagon?
- Ne, mi devas legi, multe legi.
 - Same kiel la studentoj. Do, vi ne laboras. Bonŝanculo!
- Kion? Ho, mi komprenas. Tio estas ĝusta. Mi pensas, ke mi devas peti al vi pardonon.
 - Mi pardonas vin, estas jam en ordo.

Kaj nun ludu la interparolon mem!

Sprachexamen zum Niveau B1

Für das Sprachexamen auf dem Niveau B1 müssen Sie 14 Themen aus dem Alltag beherrschen und darüber reden bzw. einen kleinen Aufsatz schreiben können. Da die benötigten Wörter (Berufe, usw.) sehr individuell ausfallen, kann ein Lehrbuch nicht sämtliche Situationen berücksichtigen. Die in den folgenden Lektionen behandelten 14 Themen sind daher als Beispiele anzusehen. Überlegen Sie im Einzelfall, was bei Ihnen anders ist. Suchen Sie sich die von Ihnen benötigten speziellen Vokabeln aus einem Wörterbuch zusammen und verfassen Sie daraus Ihren Prüfungsdialog bzw. Ihren Aufsatz. Beachten Sie, dass Sie in einer Prüfung keine zu persönlichen Dinge beantworten müssen; Sie können also auch beliebig von der Wahrheit abweichen. Es geht ja darum, Ihre Redegewandtheit zu überprüfen, nicht darum, Sie auszuhorchen.

14. Ekzameno sur baza nivelo (B1),

temo 1: Personaj kaj familiaj indikoj

- sinprezento, prezento de sia familio,
personaj indikoj
- profesio de la ekzamenato kaj de familianoj
- familiaj festoj, tradicioj

bazo : Basis, Grundlage

prezenti : vorstellen

festi : feiern; festo : Fest
tradicio : Tradition

Fonto:

Kóródy, Zsófia et al.: Esperanto de nivelo al nivelo,
Budapest 2008.

Lernu la necesajn novajn vortojn.

necesa : notwendig, nötig

Poste kompletigu la ekzemplan dialogon per viaj
personaj indikoj.

14.1.

Bonan tagon, mi estas Maria Majer, la ekzamenanto.

Ĉu vi povas prezenti vin?

Volonte. Mia nomo estas

{Wohnort, Alter}

Kaj ĉu vi havas familion?

Jes. {Eltern, Geschwister, Großeltern}

Ĉu vi loĝas kun via familio?

Ne. {Familie in einer anderen Stadt, weit/nicht weit}

Ĉu vi estas edz{in}o?

Ne, sed mi havas kor-amik{in}on.

kor-amiko : "Herzensfreund"
(feste Beziehung)

{wohnen aber nicht zusammen} / oder:

Ne, mi vivas sola.

sola : allein

14.2.

Kiun profesion vi havas?

Mi estas bibliotekisto en la universitato.

bibliotekisto <m/f> : Bibliothekar

(Schlagen Sie Ihren Beruf in einem Wörterbuch nach.)

Bone. Ĉu vi volonte laboras?

{Meist interessant, mal auch schwierig

Arbeit gibt Lebensfreude, liebe Bücher}

Kaj kion faras viaj gepatroj?

{Vater Lehrer, Mutter Ärztin, hat Berufspause

und erzieht die jüngeren Geschwister des Prüflings}

(Überlegen Sie, was Sie antworten könnten)

14.3.

Ĉu vi foje havas feston en la familio?

Nu, jes.

nu : Nun, ...

{Hochzeit von Onkel und Tante,

Sommerfest der ganzen Familie, Kristnasko}

Kristnasko : Weihnachten

Ĉu via familio konas certajn tradiciojn?

Ne multajn.

{Am Muttertag kommen alle Kinder.

naskiĝtago: da ruft man an.

naskiĝ/tago : Geburtstag

Beim Sommerfest und an Weihnachten ist es ebenfalls Tradition, dass die ganze Familie zusammenkommt.}

Via raporto estis tre interesa. Koran dankon!

Ne dankinde. Mi tion volonte faris.

Ne dankinde! : Nichts zu danken!

15. Ripetu jenajn afiksojn.

Kontroli, ĉu vi memoras kaj komprenas ĉiujn:

kontroli : kontrollieren

10 Prefiksoj:

bo-, ĉef-, dis-, ek-, fi-, ge-, mal-, mis-, pra-, re-

27 Sufiksoj:

-aĉ-, -ad-, -aĵ-, -an-, -ar-, -ĉj-, -ebl-, -ec-, -eg-,

-ej-, -em-, -end-, -er-, -et-, -ig-, -iĝ-, -il-, -in-,

-ind-, -ist-, -nj-, -obl-, -on-, -op-, -uj-, -ul-, -um-

Vi konas pli da vortoj ol vi scias. Enmetu afiksojn en jenajn frazojn kaj ripetu la frazojn en la Germana lingvo.

- 15.1 Homo, kiu laboras per aŭ por Esperanto, estas Esperant....o.
- 15.2 Membro en Esperanto-kurso estas kurs....o, kaj la aliaj estas liaj samkurs....oj.
- 15.3 En granda domo povas esti pluraj loĝ....oj.
- 15.4 Gepatroj nur malfacile al kutim....as al la longa telefon....o de siaj gefiloj.
- 15.5 Kiam oni komencas sidi, onisidas.
- 15.6 Zamenhof kurac....is multajn homojn. Komence li estis ĝenerala kurac....o, poste, pli speciale, okul....o.
- 15.7 Por pli bone povi teni varm....an tason en la mano, la taso havas kutime ten....on.
- 15.8 Tiu ĉi erar....o en mia teksto estas nurtajp(aĵ)o. erari : irren; eraro : Fehler
- 15.9 Io legata estas leg....o, kaj io skribita estas skrib....o.
- 15.10donita feliĉo estas plur....a feliĉo.
- 15.11 La gepatroj de Anna vokas ŝin ĉiam nur A....o, dum Anna diras al ili "pa....o kaj pa....o".
- 15.12 Kiu ĉiam volas scii ĉiujn nov....ojn, estas tre scivol....a.
- 15.13 La aŭto veturis kun tro alta rapid....o.
- 15.14 La antaŭ-....oj de miafamilio ne estas miajuloj.
- 15.15 Bonan tagon,sinjoroj Majer! Pardonu, ke mi ne tujkonis vin.
- 15.16 Mi ne dirus, ke tiu libro estas leg....a, sed ĝi certe estas leg....a.
- 15.17 Homo, kiu profesie veturas sur la maro, estas mar....o.
- 15.18 „Kamarado“ signifas „samkamer....o“ aŭ „kamerkun....o“. kamarado <m/f> : Kamerad
- 15.19 Infano: "La supo ne bongustas. Mi ne volas manĝi ĝin." supo : Suppe
Panjo: "...riĉaj infanoj en aliaj landoj ĝojus, se ili havus nur du....on de via supo." gusto : Geschmack; gusti : schmecken
Infano: "Mi ja same."
- 15.20 Mi demandis Katarinon, ĉu ŝi volas iĝi mia edz....o, sed tiuulino nur malbelsone rid....is.
- 15.21 Tiu teksto ne estas kompren....a, ĉu vi povas klar....i la enhavon al mi? en/havo : Inhalt
- 15.22 Afikso estas vort....o, sed manlibro kun fremdaj vortoj estas vort....o.

- 15.23 Por kelkaj aferoj ne estas kaŭzo,
ili ŝajne de si mem ek...as.
- 15.24 Diri la literojn de vorto laŭvice, estas liter...i. litero : Buchstabe
- 15.25 Oni montras malbonan edukon, kiam oni daŭre
manĝ...as per la fingroj kaj ne per manĝ...oj.
- 15.26 Kie oni eniras, tie estas la enir...o;
kie oni eliras, la elir...o.
- 15.27 Anstataŭ "Pollando" oni povas diri ankaŭ
"Pol...o".
- 15.28 Per komputilo oni povas ankaŭ kalkuli,
sed kutime sufiĉas poŝkalkul...o.
- 15.29 „Plulegi“ signifas: „daŭr...i la leg...on“.
- 15.30 Instru...o de lern...o estas samtempe
ankaŭ eduk...o.
- 15.31 Por paŭzi mi volonte trinkas kafon en kaf...o.
- 15.32 - Nia aŭto estas granda, ni sidis iam dek...e en ĝi. iam : irgendwann, einmal, einst
- Tio estas nekred...a, vi tro...as. kredi : glauben
- 15.33 La redakt...oj laboras en la redakt...o.
- 15.34 Ĝenerale oni ne plu uzas ordinaran tajp...on,
sed komputilan pres...on.
- 15.35 Sport...ojn ofte pridemandas intervju...o
kun fot...o.
- 15.36 La granda strato, kiu iras meze tra la urbo,
nomiĝasstrato.
- 15.37 Kiam oni foriras, oni diras „Ĝisvido!“.
- 15.38 Post kiam oni studis mult...e da jaroj,
oni trapasas ekzamenon kaj iĝas scienc...o.
- 15.39 Avar...o ne prunte donas monon eĉ al sia
proksim...o.
- 15.40 La laŭtparol...o en la teatr...o komunikis,
ke la homoj povaspaŭzi.

Nun diru unu vorton kun afikso al alia kursano kaj tiu formu kompletan frazon, en kiu aperu via vorto.

16. Intervjuo

16.1

Intervjuisto: Bonan matenon, sinjoro. Mia nomo estas Karlo Pridemandema.

Mi volas intervjui vin, ĉu en ordo?

Studento: Bonan matenon, sinjoro Pridemandema. Jes, tio estas en ordo.

16.2

Bone, dankon. Ĉu vi povas diri, kiel vi nomiĝas kaj kion vi faras ĉi tie?

Jes, mi estas Ivo Scionto, kaj mi legas libron.

16.3

S-ro Scionto, legi libron kutime estas hobia. Ĉu vi havas nun libertempon?

Ne, mi estas studento kaj legi libron signifas por mi studi.

16.4

Multaj homoj pensas, ke studentoj havas bonan vivon. Ili nur malofte laboras.

Tio ne estas ĝusta. Studi estas labori.

16.5

Se oni diras „labori“, tiam la homoj kutime pensas pri manlaboro.
Studi certe ne estas manlaboro. Kiel vi povas klarigi, ke vi same laboras kiel ordinara laboristo?
La laboro de studento certe ne estas la sama kiel tiu de laboristo.
Studi signifas labori per la kapo, kaj vespere mi kutime estas sufiĉe malforta.

16.6

Sed studentoj ne produktas ion, ĉu ne?
Ankaŭ tio ne estas ĝusta. Per studo oni produktas scion en sia kapo,
kaj tiun scion oni post la ekzameno uzas por profesi-nivele, science labori.
Sen studentoj poste ne estas sciencistoj, kaj ekskluziva manlaboro ne sufiĉas.

16.7

Multaj homoj pensas, ke studentoj ne konas manlaboron.
Ankaŭ tio ne estas vera. Studento, kiu ne ricevas sufiĉe multan monon de la gepatroj,
devas ankaŭ manlabori por vivteni sin.

16.8

Bone, mi komprenas. Do, studentoj ne estas nur libertempuloj.
Certe ne.

16.9

Sinjoro Scionto, mi dankas vin, ke mi povis intervjui vin.
Mi ankaŭ dankas al vi, sinjoro Pridemandema.

Kaj nun ludu la intervjuon mem ...

17. Ekzameno sur baza nivelo (B1),

temo 2: Hejmo kaj ĉirkaŭaĵo

- prezenti sian domon / loĝejon kaj ĉirkaŭaĵon
- prezenti sian loĝ-urbon / loĝokvartalon / vilaĝon
- studentohejmo, luata loĝejo:
argumentoj por kaj kontraŭ

ĉirkaŭ(aĵ)o : Umgebung
kvartalo : Stadtviertel
vilaĝo : Dorf
lui : mieten
argumenti : argumentieren

Lernu la novajn necesajn vortojn.
Poste kompletigu la ekzemplan dialogon per viaj
personaj indikoj.

17.1

Bonan vesperon, mia nomo estas Karlo Koro.
{Begrüßung als Antwort, seinen Namen sagen}

Unue mi ŝatus scii, ĉu vi loĝas en domo aŭ en loĝejo?

{Haus der Eltern, eigenes Zimmer
oder eigenes Apartment /
gemietete Wohnung / gemietetes Zimmer
im Souterrain /
im Keller /
im Erdgeschoss /
im Dachgeschoss

propra : eigen/er (-e, -es)
apartamento : Apartment

etaĝo : Etage, sub/ter/etaĝo : Souterrain
kelo : Keller
ter/etaĝo : Erdgeschoss
tegment/o : Dach;
sub/tegmenta etaĝo : Dachgeschoss
= sub/tegment(ej)o
plur/etaĝa : mehrstöckig

eines mehrstöckigen Hauses}

17.2

Bone, kaj kia estas la ĉirkaŭaĵo?

(un)ruhige(s) Viertel / Stadt / Dorf
viel/wenig Verkehr
helle/düstere Straßen
viele/wenige Bäume
viele/wenige Grünanlagen
nah/weit Park zum Spaziergehen

nah/weit Bushaltestelle

nahe/weite Läden

(un)gemütliche Gaststätten / Kneipen

trankvila : ruhig
trafiko : Verkehr
hela : hell
arbo : Baum
verda : grün; verd/aĵ/ejo : Grünanlage
parko : Park
promeni : spazieren gehen
buso: Bus
halti : halten; haltejo : Haltestelle
magazeno : Laden
hejm/eca : gemütlich/er (-e, -es)
gasto : Gast; gast/ejo : Gaststätte
trink/ejo : Kneipe

17.3

Ĉu vi vespere ofte renkontiĝas kun amikoj?

{Ja, Gaststätte/Kneipe/Kino/Theater/Diskotheke /
nein, keine Zeit, bis spät in die Nacht studieren}

renkonti : treffen; renkontiĝi : sich treffen
teko : Tasche; Aufbewahrungsort
disko/teko : Diskothek

17.4

Ĉu oni pli bone loĝas en luata loĝejo aŭ en studenta
hejmo?

{Argumentoj por luata loĝejo:

pli granda, pli luksa
gasto povas tranokti
propraj necesejoj kaj lavejoj

lukso : Luxus; luksa : luxuriös
tra/nokti : übernachten
neces/ejo : Toilette
lavi : waschen; lav/ejo : Waschraum

argumentoj por ĉambro en studenta hejmo:

pli malmultekosta
neniam sola / soleca
simpla loĝokontrakto
kann mit anderen Studenten desselben
Faches zusammensitzen und gemeinsam:
über spezielle Probleme grübeln /
in der Studentenküche kochen und essen

multe/kosta : teuer
sol/eca : einsam
kontrakt/o : Vertrag

alia alternativo:

loĝokomunumo}

alternativo : Alternative
komun/umo : Gemeinschaft

17.5

Bone, koran dankon pro viaj informoj. Mi nun bone
povas imagi vian loĝejon kaj ĝian ĉirkaŭon.

Ne dankinde. Estis por mi plezuro.

Ĝis revido, {nomo de la ekzamenito}

Ĝis revido, sinjoro Koro.

imagi : sich vorstellen, vor Augen führen

18. Interparoloj. Post kiam vi legis la tekston, ludu la interparolon mem.

18.1a

- Bonan tagon, Beate. <Wie> vi fartas?

- Bonan tagon, Hugo. Mi fartas <ziemlich = genügend> bone, kaj vi?

- Dankon, ankaŭ mi sufiĉe bonfartas. Sed mi <muss> konfesi, ke mi estas tro <dick>.
 - Ĉu vere? Kaj <was> vi faras? Ĉu vi <treibst Sport> aŭ ĉu vi manĝas malpli?
- Kaj, kaj. Mi multe <fahre Rad> kaj nur <wenig> manĝas.
 - Ne diru! <Vielleicht> sufiĉas, se vi nur <abends> ne manĝas ion.
- Ne, mi ankaŭ malmulte <frühstücke>. Nur panon, kaj <außerdem> mi trinkas kafon.
 - Ĉu kafon? Tio ne <ist möglich>.
- Ĉu vi pensas, ke mi pli bone <trinken soll> teon?
 - <Keineswegs = gar nicht>! Ankaŭ teon vi ne trinku.
- <Also>, mi ne trinku ion kaj manĝu nur panon.
 - Panon! Ho, <gerade = ausgerechnet, richtig> pano estas malbona, se vi ne volas resti dika.
- Kio? Ĉu ne trinki, ne manĝi? Ĉu vi povas <erklären> al mi, kiel mi vivu tiel?
 - Vi ja ne diris, ke vi volas vivi. Vi diris, ke la <Haupt->afero estas esti <dünn>.

18.1b

- Bonan tagon, Hugo. Kiel vi <geht es>?
 - Bonan tagon, Beate. Mi fartas sufiĉe <gut>, kaj kiel vi?
- Dankon, ankaŭ mi <genügend> bonfartas. Sed mi devas <gestehen>, ke mi estas tro dika.
 - <Wirklich>? Kaj kion vi faras? Ĉu vi sportas aŭ ĉu vi manĝas <weniger>?
- <Sowohl als auch>. Mi multe biciklas kaj nur <wenig> manĝas.
 - <Sag bloß! = Sage [das] nicht>! Eble sufiĉas, <wenn> vi nur vespere ne manĝas ion.
- Ne, mi ankaŭ malmulte <frühstücke>. Nur panon, kaj krome mi trinkas <Kaffee>.
 - <Kaffee>? Tio ne eblas.
- Ĉu vi <denkst>, ke mi pli bone trinku teon?
 - Tute ne! Ankaŭ teon vi ne <sollst trinken>.
- Do, mi ne trinku <irgendwas> kaj manĝu nur <Brot>.
 - Panon! Ho, ĝuste pano estas <schlecht>, se vi ne volas <bleiben> dika.
- <Was>? Ĉu ne trinki, ne manĝi? Ĉu vi povas <erklären> al mi, <wie> mi vivu tiel?
 - Vi ja ne diris, ke vi volas <leben>. Vi diris, ke la <Hauptsache> estas esti <dünn>.

18.2a

- Bonan tagon!
 - Bonan tagon ankaŭ al vi!
- <Anscheinend> ni ankoraŭ ne konas nin. Mi estas Otto.
 - Bone, Otto, kaj mi estas Pascal.
- De kie vi venas?
 - <Heute>?
- Ne, mi <wollte> demandi, kie vi loĝas.
 - Ho, mi komprenas. Mi venas de Strasburgo, kaj de kie vi?
- Mi venas de Essen.
 - Tiam vi estas <Deutscher>, ĉu ne?
- Jes, kaj vi <Franzose>.
 - <Natürlich>. - Kion vi laboras? <Was = welcher> estas via profesio?
- Mi estas studento de la <Universität> de Essen.
 - Studento, mi komprenas. Mi estas <Redakteur>.
- <Entschuldigen Sie> la ŝercon: Redaktisto <professionell> redaktas tekstojn, kiujn li ne komprenas,
ĉu ne?
 - Mi <gern> reŝercas: Kaj studentoj profesie studas aferojn, <die> ili ne komprenas.
(Ili ridas)

18.2b

- Bonan tagon!
 - Bonan tagon ankaŭ <Ihnen>!
 - Ŝajne ni ankoraŭ ne <kennen> nin. Mi estas Lara.
 - Bone, Lara, kaj mi estas Jacqueline.
 - <Woher> vi venas?
 - Ĉu hodiaŭ?
 - Ne, mi volis demandi, kie vi <wohnt>.
 - Ho, mi komprenas. Mi venas de Strasburgo, kaj de kie vi?
 - Mi venas de Essen.
 - Tiam vi estas <Deutsche>, ĉu ne?
 - Jes, kaj vi <Französin>.
 - Kompreneble. - <Was> vi laboras? Kiu estas via profesio?
 - Mi estas studento de la universitato de Essen.
 - Studento, mi komprenas. Mi estas <Redakteur>.
 - Pardonu la ŝercon: Redaktisto profesie <redigiert> tekstojn, kiujn li ne komprenas, ĉu ne?
 - Mi volonte <“scherze zurück“>: Kaj studentoj profesie studas <Sachen>, kiujn ili ne komprenas.
- (Ili ridas)

19. Adiaŭa kanto

Adiaŭ! : Lebe wohl!

(Melodie: Auf Wiedersehen! Auf Wiedersehen!)

Esperanta versio: © Rudolf Fischer

Nun diru „Ĝis / revido” ni!
Ne restu longe for!
Malĝoje vivos mi sen vi,
doloros mia kor’.

Ni diru „Ĝis / revido” nur!
Al vi konfesas mi:
Sen vi ne estos plu plezur’
ĝis la revid’ kun vi!